

[noto] el "La Japana Budhano", n-roj 330-333 (2005-2006)

Ŝooŝinge, Himno pri la Ĝusta Konfido

libera traduko, de Yamaguti Sin'iti

Eterna Budho! Vekiĝinte je via alvoko, mi reiru al la nemezurebla vivo
kaj oferu mian estimon al la neimagebla lumo.

Dharmakara estis via nomo, kiam vi serĉadis la vojon for la landon kaj la
kronon.

Vi servis al la Budho Lokakiteŝvara,
ekzamenis la kaŭzon de ĉiuj Budholandoj,
trovis la veran figuron de homoj kaj landoj,
starigis la fajnan voton mem konstrui puran landon kaj
ekhavis la unikan ĵuron vivi kun ĉiuj vivestaĵoj.

Dum neimageble longa tempo vi profundigis vian penson, elektis multajn
votojn, enmetis ilian esencon en vian Nomon kaj
alvokis al ĉiudirektaj mondoj, ke ĉiuj vivestaĵoj aŭskultu bone vian Nomon
kaj komprenu ĝian devenon, kun la nepre plenumota voto.

Via Nomo eligas ĉien tra la mondo la Lumon, kiu estante nemezurebla,
senfina,

senobstakla, senegala, brulanta kvazaŭ flamo,
purpura, ĝojiga, briliganta profundan saĝon,
senhalta, neimagebla, neesprimebla per vortoj kaj
pli hela ol la suno kaj la luno, lumigas ĉiujn angulojn de la mondo;
ĉiuj vivoj partoprenas la gracon de la Lumo.

Vi fariĝis la eterna Budho Amitabho de la lando de voto, la Purlando; via Nomo iĝis la vera vorto Namuamidabucu, kiu laboras por direkti nin al la ĝusta vojo de la homa vivo.

Via sincereco allaboras la radikon de nia vivo kaj vekas ĉe mi la veran koron.

Se mi iam povos vekiĝi je la signifo de la vivo kaj atingi nirvanon, tio estas dank' al via plenumita voto, "ĉiuj vivestaĵoj nepre atingu nirvanon."

Mi konsideras en mia sino: Ŝakjamunio afablis aperi en tiun ĉi mondon nur por prediki vian Voton, kiu estas profunda kaj vasta kiel maro.

Ĉiuj vivestaĵoj, kiu, estante en la kota mondo kaj en la malbona epoko, dronas en la suferoplena maro,

kredu la veran vorton de la Budho.

Kiam ĉe ni unu fojon ekestas la koro de kredo, ĝojo kaj amo,

ni povas akiri la nirvanon de Budho sen fortranĉi afliktojn kaj ĉagrenojn.

Kaj banaluloj kaj sanktuloj, ankaŭ ribelantoj kaj kalumniantoj, ili ĉiuj povas esti savitaj, kiam ili unu fojon turnas sian koron.

Tio estas same kiel diversaj akvofluoj enirinte en la grandan maron kunfandiĝas en unu.

La Budha koro forlasas neniun, prenas sur sin, ĉiam lumigas kaj gardas nin ĉiujn.

Kvankam la mallumo de nia malklareco estas jam rompita,

la nuboj kaj nebulo de niaj avidemo, kateniĝo, kolero kaj malamo

ĉiam kovras la ĉielon de la Budha vera koro.

Tamen, eĉ se la sunlumo kovriĝas per nuboj aŭ per nebulo,

la suba mondo estas hela kaj ne mallumiĝas; tiel same, la Budha vera koro estas ĉiam hela kaj klara.

Kiam ni akiros la veran kredon, kiu estas granda ĝojo pro vido kaj estimo al la vera vivo,

tiam la forto de la voto tuj distranĉas malbonajn sferojn de iluzio.

Se ĉiuj homoj katenataj de bono kaj malbono aŭdinte la Budhan voton kredas ĝin,

la Budho laŭdas ilin, ke ili estas vere komprenintaj.

Ili estas nomataj Pundarika, la blanka lotuso, kiu floras el sub koto kaj tamen neniam makuliĝas de malpura koto.

Nembucu, vokado la nomon de la Budho sen forgeso de la voto de la eterna Budho,

por tiuj kiuj estas arogantaj kaj fieraj je si kaj ne estimas aliajn homojn, estas malfacile kredebla, se ili ne ŝanĝas sian koron.

Havi kredon estas la plej malfacila afero en la vivo.

La hindaj budhismaj filozofoj Nagarjuna kaj Vasubandhu,

la ĉinaj bikŝuoj Tanluan, Taŭĉo kaj Ŝandaŭ, kaj la japanaj Genŝin kaj Genku,

ili ĉiuj montris la veran signifon de la naskiĝo de Ŝakjamunio en tiu ĉi mondo,

kaj klarigis, ke la Budha voto savas ĉiujn homojn, estante konvena al la efektiva cirkonstanco de realaj homoj.

Kiam Ŝakjamunio predikis sur la monto Lanka,

li antaŭdiris antaŭ bikŝuoj:

"En la suda Hindio aperos la granda majstro Nagarjuna;

li post mia morto frakazos la ideojn kaj de esto kaj de malesto, kiuj kontraŭas la veron;

li predikos la fajnan instruon kvazaŭ granda ŝipo, kiu savas ne nur unu homon sed ĉiujn vivojn,

kaj mem atestante ĝojon en siaj korpo kaj koro naskiĝos en la lando de vervekiĝo, kiu trankviligas nian vivon."

La bodisatvo Nagarjuna montris la du vojojn al vervekiĝo. Unu el ili estas malfacile alirebla, same kiel surtera vojo sen akompananto.

Tamen la alia vojo estas facile alirebla, same kiel perŝipa vojo agrabla kun ĉiuj aliaj. Ĝi signifas transiri la maron de ĉagreno kaj atingi la bordon de vervekiĝo, lasante sin al la ŝipo de la Budha voto.

Tial, se vi ne forgesante la Budhan voton tenadas ĝin en via koro, al vi tuj estas destinita la pozicio, ke vi nepre vervekiĝos sen regreso.

Estas grave, ke vi ĉiam nur vokadu la Budhan nomon kaj tiamaniere rekompencu la favoron de lia granda voto kaj kompatu.

La Bodisatvo Vasubandhu esprimis la Budhan koron en sia "Traktaĵo pri Pura Lando" ĉi tiel:

"Mi aŭskultu kaj kredis la devenon de la Budha lumo senbara."

Li surbaze de la Sutro pri Nemezurebla Vivo montris la veron,

klarigis la Budhan voton, kiu transirigas nin tuj la sferon de iluzio.

Li sciigis nin, ke la Budho turnis la forton de sia voto al ĉiuj direktoj,

kaj ke la laboro de Budho savi ĉiujn aperas en unu koron kredi la Budhan voton.

Se ni kredas la voton, kiu estas vasta kiel la trezora maro plena de Budha graco,

ni nepre partoprenas la aŭskultantaron de Budha prediko.

Kiam ni atingos la Budhana landon, la mondon ornamitan de lotusa floro,

ni tuj ricevus la korpon de vervekiĝo je darma esenco,

ne perdante la sensivon al vivo e ĉ en la mezo de blindaj pasioj,
eniros la realan vivon de maltrankvilo je naskiĝo-kaj-morto, kaj tamen
renkontas, alvokadas, interrilatadas aliajn homojn, kvazaŭ estante ludanta
en arbaro aŭ ĝardeno.

Tiel estis lia vorto.

La Majstro Tan'luan estis ĉiam estimata kaj adorata kiel bodhisatvo
de la reĝo de Liao-dinastio.

Li renkontis la tripitakan Majstron Bodhiruci, kiu donis al li la Sutron pri
Nemezurebla Vivo,

kaj bazis sin sur la Lando de Budha Voto, forbruliginte la taoismajn sutrojn,
kiuj predikas pri superstiĉo de longa vivo kaj senmorteco.

Li en sia komentario al "Traktaĵo pri Pura Lando" de Vasubandhu diris,
ke la kaŭzo de la rekompencita Lando kaj de la nasikiĝo tien devenis de la
Voto.

Kaj iri al la Lando kaj reveni de la Lando eblas nur per la Alia Forto, kiun la
Budho transdonas al ni, sed ne per nia memforto.

La kaŭzo, kiu difinas nian paŝon al la direkto vivi en la vero, kuŝas nur en la
koro fidi la Voton.

Kiam ŝanceliĝemuloj unu fojon ekhavas la koron de fido,

ilia maltrankvilo pro naskiĝo-kaj-morto tuj fariĝas vervekiĝo; ili rimarkas, ke
ilia vivo nepre havas signifon.

Tiu, kiu vivas en la mondo de Senlima Lumo,

nepre briligas ĉiujn vivojn.

Daoshao profunde studis la budhisan historion kaj decidis forĵeti la vojon
de sanktuloj, ĉar ĝi ne povas atingi vervekiĝon,

Li do atestis, ke la pordo en vervekiĝon estas malfermata al la vojo naskiĝi en la Pura Lando, la Lando de Budha Voto.

Ĉar akumuli multajn bonagojn kaj strebi al memforta praktikado estas vane, li rekomendas nur vokadi la Budhan Nomon posedantan plenan virton pro la Voto.

Li ankaŭ instruis por pli facila kompreno la rilaton inter ĉiam malfidema koro kaj la vera fido, dirante

ke eĉ se venos la tempo, kiam budhismo pereos, la Budha koro same kiel antaŭe gvidos nin kun sia kompato,

kaj ke eĉ homoj, kiuj faradis malbonaĵojn dum sia tuta vivo, se ili renkontos la Budhan Voton,

atingos la mondon faciliganta la vivojn kaj tie vervekiĝos.

Ho, Ŝandaŭ! Vi sola trovis kaj malkovris la profundan koron de la Budho Ŝakja-munio en la Kontemplada Sutro.

Li kompatis kaj bonulojn strebantajn al samadio kaj bona ago kaj malbonulojn ĉiam enfalantajn en malbonaĵojn, ĉar amba ŭ egale ripetas naskiĝon-kaj-morton.

Li montris la vojon, sur kiu oni povas ŝanĝi sian koron kaj vekiĝi, kondiĉe ke oni renkontu la Budhan lumon de lia saĝo kaj aŭd-voku la Budhan nomon.

Per la profunda saĝo de la Budha voto,

tiu kiu praktikas vokadon de la Budha nomo, nepre ricevas la diamantan koron sur sin.

Tiu koro plena de ĝojo unuiĝas kun la Budha koro;

tiam oni same kiel Vaidehi, kiu renkontis Ŝakja-munion en la fundo de despero, gajnas ĝojon, vekiĝon kaj saĝon.

Tiamaniere oni akiras la eternan vivon kaj vivĝojon. Li diris ĉi tiel.

Genŝin vaste eksplikis budhismon

kaj fervore rekomendis al ĉiuj reveni al la mondo de trankvilo.

Li ankaŭ distingis du specojn de kredo: la unua estas rekta kaj profunda koro kaj la alia

estas malprofunda koro miksitaj kun diversaj emoj.

La unua atingas la veran Purlandon kiel rekompenco por la voto, dum la alia restas en la provizora lando kovrita de duboj.

"Ekstremaj malbonuloj nur vokadu la Budhan nomon.

Ankaŭ mi, superverŝita de la lumo de la voto,

ne kapablas vidi la lumon pro miaj okuloj vualitaj de kleŝoj.

Malgraŭ tio la Budho de granda kompato ĉiam pacience kaj sentede lumigas min." Tiel li diris.

Mia majstro Genku klare montris, ke budhismo estas por la popolo,

esperis, ke kaj bonuloj kaj malbonuloj kiel banalaj homoj vervekiĝu,

kaj malkovris la veran budhimon en tiu ĉi Japana insulo, la angulo de Azio.

Tiamaniere la primara voto, kiun la Budho mem elselektis, disvastiĝis en tiu ĉi putrita mondo plena de diskriminacioj kaj militoj.

"Oni ĉiam post longa migrado revenas al la hejmo de metempsikozo inter naskiĝo kaj morto;

tiu kaŭzo certe troviĝas en la dubo pri la Budha voto.

Tuj forlasi la hejmon kaj eniri en la mondon de nirvano kvieta kaj trankvila oni plene povas nepre per la kredanta koro." Tiel li diris.

La grandaj majstroj fervore disvastigintaj la Budhan instruon

aŝablis savi la mondon malpurigitan kaj plenan de malvirtaj homoj.

Kaj bikŝuoj irantaj sur la Budha vojo, kaj laikoj paŝantaj kredante la instruon, ili ĉiuj kune kaj harmonie

nur rektanime sekvu la instrukciojn de ĉi-supraj majstroj.